ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 12

Decembro 2015 Kol.368/31

xxxx

La eventon partoprenis 98 esperantistoj el 13 landoj. Ni loĝis en la komforta tristela hotelo “Sant Marco”, kie ni bone manĝis kaj ĉiuvespere povis danci ĝis la noktomezo. Por niaj ĉiutagaj aktivaĵoj ni havis je dispono grandan salonon. En la inaŭguro ni havis la plezuron bonvenigi la urbestrinon de Roses, s-inon Montse Mindam. Ŝi adresis al ni agrablajn vortojn kaj bondeziris sukcesan E-Semajnon. Ŝi menciis ankaŭ, ke en la fora pasinteco en la urbo jam ekzistis esperantista grupo.

Dum la semajno okazis pluraj interesaj prelegoj, debatoj kaj diskutoj. Kun Dalia Pileckiené el Litovio ni lernis kiel mastrumi nian tempon. Alian tagon ni alfrontis iom komplikan temon, kiun ni devis solvi el psikologia vidpunkto. Gesinjoroj Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer el Svislando prezentis la libron “Historio de la Esperanta literaturo”. Giorgio verkis ĝin komune kun Carlo Minnaja. Interesatoj povis aĉeti ĝin surloke. Alia ilia prelego temis pri ENA (Esperanto Natur-Amikaro). Ni akiris informojn pri ilia laboro kaj pri la estontaj planoj. Marcel Delforge el Belgio parolis pri la historio de Neutrala Moresnet, kie estis fondita kaj iom da tempo ekzistis Esperanto-Amikejo.

Gesinjoroj Buŝs el Latvio prezentis verkojn de la latva poeto Imants Ziedonis. Prelego de Luis Serrano temis “Ĉu malaperos nia planedo Tero?” Tio estas pripensenda temo...

Vespere ni ĝuis du interkoniĝojn kun vino kaj dolĉaĵoj. Bonan etoson kreis la folklora grupo “Montjuic”, kiu ĝojigis nin per belaj kantoj “Habaneras”. Ne mankis nia ŝatata “cremat” - bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj. Unu vespero estis dediĉita al opero. Laŭ propono de Maria Ferigle ni spektis sur ekrano la operon de la itala komponisto Giacomo Puccini “Madame Butterfly”.
La premio “Ada Sikorska” estis atribuita al la pola blinda poetino kaj prozverkistino Halina Kuropatnicka-Salamon pro ŝia meritplena poresperanta

laboro. La prestiĝan premion oni jam pli frue sendis al ŝi okaze de festa renkontiĝo. S-ino Halina estis tre kortuŝita kaj sendis dankleteron al s-ro Luis Serrano.

Kiel jam konate Rodica Todor el Rumanio ĉiam proponas interesan instruprogramon. Ĉi-foje ni debatis pri strategioj de komunikado en homaj interrilatoj. Ni laboris en grupoj kaj alfrontis diversajn temojn. Ekzemple, konfliktoj inter generacioj, diversaj grupoj, asocioj ktp. Aktuala situacio pri enmigrintoj ankaŭ estis traktita. La temoj estis tre vastaj kaj ni vigle diskutis, donis niajn opiniojn, analizis kaj provis trovi pozitivaĵojn en diversaj situacioj. Aparte ŝi organizis paroligan kurson por komencantoj.

Okazis ankaŭ ekskursoj. Dum la duontaga ekskurso ni vizitis la urbeton L'Escala, kie ni vidis en fabriko prilaboradon de anĉovoj. Poste ni gustumis ilin. Kompreneble, ne mankis aĉeteblo. En la urbo Roses ni vizitis la lokan muzeon kaj la citadelon de la 17-a jarcento kun grekaj kaj romiaj restaĵoj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la proksima urbo Figueres. Unue ni vizitis la kastelon Ferran kaj poste la faman muzeon de Dalí. Posttagmeze ni daŭrigis nian busvojaĝon ĝis la urbeto Banyoles. Tie ni restis dum kelkaj horoj ĉe la lago. Eblis ŝippromeni sur ĝi aŭ uzi turisman trajneton por traveturado de la urbo. Iuj tutsimple piedpromenis laŭ la bordo de la lago. Post agrabla kafumado kaj biertrinkado ni revenis kontentaj al Roses.
La lastan vesperon Luis Serrano lanĉis debaton pri la funkciado de la Semajno. La partoprenantoj estis plejparte kontentaj. Nur la alveno al Roses estis ĉi-foje iom pli komplika ol kutime pro neekzisto de trajno ĝis tie. Ni promesis veni denove venontjare. Tiam Luis, la ĉeforganizanto festos sian 90-jariĝon. Do, ni deziras al li kuraĝon kaj sukceson!!!

Liba Gabalda

48. Internacia Esperanto-Feriado,

okazis en Pollando de 2. – 9. 9. 2015.

En la pola banloko Duszniki Zdroj, kie ankaŭ resaniĝis la kreinto de Esperanto L. L. Zamenhof, renkontiĝis proksimume 50 esperantistoj, eĉ eksterlandaj. Ili ne nur lernis la lingvon, sed aŭskultis kelkajn prelegojn. Ni loĝis en hotelo Esperanto, proksime de la memorŝtono dediĉita al la honoro de Zamenhof.
En la domego de Chopin akceptis kaj bonvenigis nin la urbestro, ni ricevis planon de la urbo en Esperanto, poste nin gvidis tra la urbo historiisto (neesperantisto) kaj rakontis pri historio kaj vidindaĵoj. Spertaj esperantistoj tradukis. Krom lernado ni ĝuis banadon en baseno, ni ekkonis kaj gustumis bonajn polajn manĝaĵojn, ni ripozadis dum promenoj en apuda parko, ankaŭ muzikon ni aŭskultis, eĉ ni iomete dancis. Ni interparolis precipe Esperante, iomete ankaŭ pollingve. La respondeculino de la renkontiĝo Tereza Pomorska el Vroclavo, demandis min, ĉu mi povus gvidi kurson de progresintoj . Mi konsentis, kvankam mi ne estis preparinta min. Do mi komencis kiel en Skokovy. Ĉiuj estis kontentaj kaj Tereza diris al mi, ke venontjare mi „povus“ daŭrigi. Krome ni ekskursis al Nové Město nad Metují kaj Kudowa Zdroj. Mi rekomendas al ĉiuj, kiuj volas ekkoni la belecon de tiu ĉi urbeto kaj bonan kolektivon. Ĉiuj estis amikemaj, oferemaj. Certe partoprenu venontjare. Mi estis tie tre kontenta.

Líba Filipová, tradukis Pavel Nechvíle

Duolingo-kurso por hispan-parolantoj ekpreparata

Ĵus komenciĝis ĉe Duolingo la preparado de "Esperanto for Spanish speakers" - https://incubator.duolingo.com, en Incubation Phase 1. La preparado de la versio por anglalingvanoj daŭris proksimume dek monatojn - supozeble ĉi-foje la materialo pretiĝos pli rapide... Intertempe estas registritaj 165 000 Esperanto-lernantoj en la angla lingvo ĉe duolingo.com; proks. 1100 novaj lernantoj tage. Vidu ĉe Incubation Phase 2. Listo de pliaj retaj Esperanto-kursoj ĉe: http://tinyurl.com/lingvolerniloj.
Tie troveblas ankaŭ retaj vortaroj, aŭtomataj tradukiloj, lingvoludoj, kartaroj por vortolernado, perado de instruistoj kaj konversaciaj partneroj ktp.

Konstateblas, ke 90 % de la retaj senkostaj lingvopaĝoj kun almenaŭ 25 lingvoj havas nun ofertojn ankaŭ en Esperanto. Kial? Nu, eble tiu ĉi prelego helpos klarigi la kaŭzon:
http://www.esperantoland.org/dosieroj/LaLongaVosto.pdf
Lu Wunsch-Rolshoven EsperantoLand http://www.esperantoland.org/nr
lu.esperanto@gmx.de

Rapidtrajno "IC Esperanto" Warszawa – Białystok.

La pola ŝtata fervoj-entrepreno akceptis la trajno-nomon ESPERANTO En la fino de voĉdonado, anoncita pli frue, la nomo Esperanto havis 3940 voĉojn, la nomo Narew 2509 voĉojn, Bojary 200 voĉojn. La voĉdono de esperantistoj multe helpis en la diskonigo de Esperanto en la pola ekstermovada medio. Sen tia helpo la sukceso ne estus atingita! La interurba rapidtrajno funkcios ekde decembro 2015 kaj denove aŭdeblos la nomo Esperanto en polaj stacidomoj. Pli frue jam funkciis trajno kun la sama nomo inter Białystok kaj Warszawa, sed ĝi estis nuligita en junio 2013, ĉar uzis ĝin malmultaj pasaĝeroj. El ret-info

SKOKOVY

De la 21-a de oktobro ĝis la 25-a de oktobro 2015 okazis la 42-a seminario en Ĉeĥa paradizo en la pensiono Espero.
Venis malpli da homoj ol printempe, sed la etoso estis kiel ĉiam familia kaj amika, eĉ la suno iomete varmigis nin. Ĉiuj alvenintoj estis enketitaj, ĉu ili estas veraj „skokovanoj“ per speciala testo. La instruado ĉe unu tablo okazis laŭ Legolibretoj. Pinta okazaĵo estis ekskurso al la eksa banloko Sedmihorky kun la loka gvidistino Štefi. Por la mallonga vizito venis s-ano Kazdera el Liberec, li sprite parolis kaj promesis printempe prelegon pri Liberec. La pensionon venis trarigardi ankaŭ esperantisto el Bulgario (vojaĝante al la IFEF-kongreso).
La venonta seminario okazos de la 11-a de aprilo 2016. Jam nun vi povas aliĝi. Kaj nun ion interesan pri **SEDMIHORKY**:
Oriente de la origina vilaĝo *Sedmihorky* en la Ĉeĥa paradizo kreis akvan kuracbanejon la kuracisto *Antonín Vincenc Šlechta* (1810-1886) el Turnov inter la jaroj 1839-41. Li portis titolon „kavaliro Sepmonteta“. La nomon

ricevis la kuracejo laŭ sep fontoj de minerala akvo. Ili estis konataj de la jaro 1702. Ĉi tie oni kuracis per malvarma akvo kaj klimato kun freŝa aero, per korpa gimnastiko kaj per dieto. Venadis tien elstaraj personoj de la ĉeĥa reviviĝo kiel *Jan Neruda, Eliška Krásnohorská, Otilie Sklenářová-Malá, Gustav Pfleger Moravský, Jindřich Mošna, František Karel Kolár*. La doktoron Šlechta vizitadis ankaŭ famaj kuracistoj: *František Piťha, Karel Rokytanský* aŭ *Bohumil Eisel*. La trajno de Dresdeno veturigis tien germane parolantajn gastojn.

Nia grupeto el Skokovy trairis tie agrablajn arbarajn padojn kaj vizitis lokojn, kie la akvo elvenas de sabloŝtonaj putoj kun gravuritaj surskriboj. Nun ili aspektas tre malnove, muske kovritaj. La alveno al la promenado iras tra aleo de tilioj kaj kverkoj. La koloraj folioj de arboj aŭtune aromis. Ni imagis, kiel gastoj en la deknaŭa jarcento promenis ĉi tie kaj babilis, amuziĝis. Onidire estis la tagoj „damaj“ kaj „sinjoraj“. En tiuj tagoj la gastoj promenis vestitaj en littukoj, nur damoj surmetadis grandajn ĉapelojn. La doktoro krom kuracado laŭ maniero de Priesnitz aranĝis por la kuracatoj ankaŭ distrajn aranĝojn. Li kuracis per „malvarma“ metodo tifon, dum la milito en la jaro 1866 ĉi tie li kuracis vunditajn soldatojn. Malriĉulojn li flegis senpage.
Post la morto de doktoro A. V. Šlechta en la jaro 1886 la kuracado iom post iom ŝanĝadas, oni komencis uzadi ankaŭ torfajn kuvojn. En la jaro 1914 post la foriro de la kuracistoj al la milito la kuracdomoj servis por loĝado de somergastoj, kiuj tie ĝuis freŝan aeron. En la jaro 1945 la banejo *Sedmihorky*, kiel parto de la bieno *Hrubá skála* estis ŝtatigita kaj servis kiel sindikata resaniĝejo. Post la politika renverso en la jaro 1989 ĝin transprenis negoca asocio kaj la loko kadukiĝas. Lokanoj esperas, ke la ĉeĥa entreprenisto, kiu konstruigis bone prosperantan kampadejon en la areo, iom post iom renovigos la konstruaĵojn kaj la loko denove akiros sian meritan gloron.

Jindřiška Drahotová

Diamanta geedzeco de la membro de AEH en Klokoty

Sabate la 10-an de oktobro 2015 okazis en la Klokoty-preĝejo rara evento. Niaj gepatroj Marie kaj František Rytíř el Tábor ĉi tie solenis sian diaman-

tan geedzecon: pasis jam 60 jaroj de ilia geedza vivo. La 15-an de oktobro 1955 ilin geedzigis en Klokoty onklo de nia paĉjo, la pastro Ondřej Rytíř.
Mi kun miaj tri pli aĝaj fratoj volas kore dankesprimi al niaj gepatroj pro ilia amo kaj oferemo, kun kiuj ili nin edukis kaj dum la tuta vivo, ankoraŭ nun akompanas nin. Dankon al Dio por tiel kara donaco de longa kaj amoplena geedzeco.

Dum la eniro al la preĝejo je la deka horo paŝis niaj gepatroj kun orgena akompano de s-ro Ladislav Šotek. Solenan ceremonion aranĝis la pastroj Můčka kaj Karl Zaiser kun neordinara zorgemo kaj amo. Post la enira preĝo ekparolis nia plej aĝa frato Milan, kiu estas tre talenta interesi per sia rakontado (kiel pediatro) malgrandajn kaj ankaŭ pli aĝajn.
La historion de niaj gepatroj li rakontis jam de ilia infanaĝo, poste tra la unua renkontiĝo en la j.1950 en la bieno de la vilaĝo Jeníčkova Lhota, la naskiĝloko de nia panjo kaj kie aliloke ol en la bovinejo (la panjo tiam estis asistanto de bestkuracisto). Ilian pluan reciprokan konatadon kaj la evoluon de ilia amo akompanis multe da malfacilaĵoj kaj suferoj. La paĉjo, kiel filo de kulako en la vilaĝo Čekanice estis eksigita de komunistoj el la Veterinara (bestkuracista) altlernejo en Brno la lastan jaron antaŭ la fino de la studado kaj estis devigita por du jaroj al soldatservo. Post ĝia plenumo estis permesite al li fini la fakstudon.

En la jaro 1951 estis la familio de nia panjo perforte transloĝigita el sia bieno kaj ilia tuta posedaĵo estis konfiskita. Do ambaŭ devis jam junaj subordigi sin kun la malfavoro de la sorto, kiun al ili preparis aliaj. Malgraŭ ĉiuj malhelpoj ili en la j. 1955 geedziĝis kaj sinsekve naskiĝis ni, kvar infanoj. La gepatroj estis ĉiam kaj daŭre estas por ni grandaj ekzemploj kaj ni petas por ili Dian benon. Post la parolo de Milan la pastro Jiří Můčka kun granda

sentesprimo rememoris ankaŭ pri siaj gepatroj kaj sian amplenan rilaton al ili. Je konkludo li diris: "La vizaĝo de la homo montras tutan lian vivon. El la vizaĝoj de la geedzoj oni povas legi tutan historion. Kiam vi spektas iliajn rigardojn, vi povas vidi, kiel ili amas unu la alian."
Ankaŭ li rememorigis, kion la patro faras por la paroĥejo en Klokoty — kiel zorgema kronikisto, ano de paroĥa konsilantaro kaj entuziasma organizanto de pilgrimoj en Klokoty. Li almemorigis la afablan kaj ofereman zorgon de nia panjo por la familio.

Jitka Vrbová, la filino de gepatroj Rytíř.

Al la geedzoj Rytíř deziras redakcio AEH multe da sano kaj kontento.

Puraj pulmoj

estas organo de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj, fondita en la jaro 1996. Ĝin registras, en diversaj landoj ministerioj zorgantaj pri medioprotektado. Ekzemple:
Ĉinio: En Pekino post Olimpikoj oni denove enkondukis severan fummalpermeson kun monpunoj, kvankam fumantoj tre oponas.
Eŭropo: La Monda Organizo pri sano atentigis pri pasiva kunfumado, kiel grava kaŭzo de la danĝerega pulmkancero. Laŭ la takso en 2006 en EU-landoj jare mortas pro kunfumado 79 000 homoj. Fumi ĉe infanoj eĉ en privataj aŭtoj estas malpermesite en Britio, Irlando kaj Kipro. En Nederlando estas malpermesita fumado en publikaj lokoj. Ankaŭ por malgrandaj drinkejoj sen dungitoj oni lastatempe nuligis toleron de fumado. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.